

TRIMONATA. REVUO

jan. - mar. 1979

N-ro 13

vol 5

LA SKOLTA MONDO
OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

La nuna numero de LSM estas en kelkaj rilatoj alia: Vi ne trovas sur paĝo 2 kiel kutime la adresojn de la Ligo, kaj en la antaŭlasta paĝo ne la adresojn de la Naciaj Reprezentantoj.

La kaŭzo estas:

La lasta numero de 1978 ankoraŭ ne venis al mi, kaj tial ankaŭ ne la manuskriptpaĝojn, kiujn mi regule reuzas. Estas sufiĉe temporava laboro reskribi ĉi tiujn du paĝojn - kaj tial mi trovis pli utile ellasi ilin ĉifoje, kaj doni alian materialon anstataŭe.

La kaŭzo de la neapero de la lasta numero havis diversajn kaŭzoj: Unue la antaŭkristnaska trookupiteco en la presejo, poste, verŝajne, malfacilaĵoj pro strikoj k.t.p. en Britujo malebligis la sendadon.

Intertempe pluraj paĝoj de la pasinta, neaperinta ĝis nun, numeromalaktualiĝis. Ni uzis materialon el la revuo "World Scouting" por prezenti al vi la landon de la ĵamboreo.

Post la forsendo de la manuskriptoj venis la informo pri nuligo de la ĵamboreo, kaj poste - nu ja, venis la kompleta ĥaozo.

Tamen ni esperas, ke la historiaj rigardoj pri Persio/Irano ne estas seninteresaj.

En tiu ĉi numero vi trovas paĝojn pri la lando de la Universala Kongreso, Svislando. Nian dankon al la NR Otte pro tiu materialo.

NI RICEVIS:

Kanada Esperanto Asocio eldonis informilo-kaj varbilomaterialon, kiu ŝajnas al ni tre kopiinda por aliaj landoj.

Temas pri kvar diversaj, malgrandaj presaĵoj:

1. Komerco-karto pri Esperanto. Tio estas koncisa reklamo, kun loko por via nomo, adreso kaj la telefona numero. La ideo estas, ke vi kunportu stokon, kaj se iu petas vian adreson, vi donu ĝin per tiu karto.


2. Dek-paĝa broŝuro pri "The Language for International Friendship", "la Lingvo de Internacia Amikeco". La broŝuro i.a. enhavas paĝon "Esperanto per unu rigardo".

3. Karto pri lingvaj rajtoj, en kiu estas substrekata, ke ne nur personoj kies nacia lingvo estas la angla, sed ankaŭ aliaj havas egalrajtan patrinan lingvon kaj ke ili amas tiun. Tial neniu rajtas postuli superecon de sia lingvo.

4. kvitancokartojn por "amikoj de Esperanto".

Hans Amundt.

La svisa ŝtatostradreto en januaro 1973



SEL jubileas

omaĝhonoroj al niaj pioniroj

En oktobro 1978 SEL povis jubilei, ĉar tiam estis 60 jaroj depost AVOTO - la angla ekspatrolestro Alexander William Thomson - aperigis sian broŝureton "Propono pri Skolta Esperantista Ligo".

Tuj poste aliĝis al la proponita Ligo subtrupestro John W. Leslie, trupestro Norman Booth, patrolestro Douglas H. Davis, kaj iom poste la trupestroj C. B. Quain kaj W. G. Scott.

Do ili ĉiuj fariĝis pioniroj de SEL kaj ili restis fidelaj al la skoltesperantista ideo dum sia tuta vivo. Frapas min tralegante malnovajn numerojn de skoltaj esperantojurnaloj, ke tiom da konataj nunaktivaj personoj aliĝis al SEL jam antaŭ multaj jaroj - kaj ankoraŭ luktas por nia afero!

Ni komencu per la 6 prezidantoj de SEL:

- 1-a prezidanto: Avoto, funkciis dum 18 jaroj (1918 - 36) kaj vivas ankoraŭ, membro de SEL ek de 1918.
- 2-a prezidanto: Norman Booth (1936-40), mortis en nov. 1976, membro de SEL depost 1918.
- 3-a prezidanto: Douglas H Davis (1948-52), vivas ankoraŭ, membro de SEL depost 1918.
- 4-a prezidanto: Josef Van Gulck (1953-65), vivas kaj aktivas ankoraŭ, SEL-ano de antaŭ la dua mondmilito.
- 5-a prezidanto: F. Douglas Murphy (1965-70), mortis en januaro 1970 post multjara membreco.
- 6-a prezidanto: John Berggreen (1970-), membro de SEL depost 1932.

Sed ankaŭ multaj aliaj apartenas al la pionira grupo de SEL, unuavice 4 membroj de la nuntempa Centra Komitato de SEL, kiuj ĉiuj membriĝis al SEL en la jaroj 1930-39:

- J.K. Hammer el Nederlando, ĝenerala sekretario.
- David H Withey el Britujo, kasisto kaj administranto de LSM.
- Hans Amund Rosbach el Norvegujo, redaktoro de LSM (kiu tamen membriĝis nur antaŭ 20 jaroj, en 1959. Rim de red.)
- U. Paul Ronald el Kanado, nova membro de CK.

Krome jenaj 20 estas antaŭaj Naciaj Reprezentantoj aŭ aktivaj laborintoj por SEL, kelkaj ĝis antaŭ nelonge, kaj ili membriĝis ankaŭ antaŭ la dua mondmilito:

- Aŭstralio: Ralph Harry, nun ambasadoro al UNO.
- Brazilo: Euclides C Soares.
- Britujo: Charles Bardsley (1920-1977!)
- Ceĥoslovakio: St. Lešinger.
- Danlando: Eskil Svane, nun ambasadoro al UNO.
- Finnlando: Seppo Iella.
- Francujo: Georges Ramboux.
- Hispanujo: A: Pedro Marqueta.
- Hungarujo: Paul Balkanyi.
- Italujo: Franco Tulone.
- Japanujo: Sinzo Sumiya.

Kanado: John H.F. Hoyle.
Kongo: Paul Deloin Nzemba-Paku.
Nederlando: Jos.L.H. Moll.
Norvegujo: Lars Kåre Hunnes.
Polujo: Jozef Toczyski.
Portugalujo: Joao Patricio de Melo.
Svedujo: Börje Söderlund.
Svisujo: Greta Merz.
Usono: Ken Collins.

Ankaŭ multaj aliaj meritus mencioni kaj dankon, sed bedaŭrigo ne estas loko por tion fari.

Ni salutas kaj dankas ilin plenkore pro ilia sindona kaj persista laboro por SEL! Ili ne nur estis pioniroj, sed ili preparis la grundon tiom bone, ke la posteuloj povis riĉe rikolti el la semo, kiun ili kune plantis.

Tial ni devas nun fortigi niajn strebojn por farinian Ligon ankoraŭ pli mond vasta kaj respektita. Tiucele mi sendis al CK proponon pri nova Organizplano de SEL, celante pli grandan Centran Komitaton de entute 10 membroj, nome 5 en la Liga Estraro kaj 5 en nova Konsilantaro, po unu el la 5 kontinentoj. Samtempe estas montrita al kvar diversaj kategorioj de reprezenteco por SEL, kaj al kvar listoj (A-B-C-C-) pri laborkampoj por ni (entute 146 landoj).

Do ni havas treege multajn kaj vastajn taskojn farendajn, kaj ni bezonas la helpon kaj kunlaboron de multaj esperantistoj kaj skoltoj por povi kune antaŭenpuŝi la fortigon de SEL!

MI DEZIRAS AL VI ĈIUJ PROSPERAN NOVJARON 1979!

John Berggreen
John Berggreen.



(Daŭrigo el p 136 : La ĵurletero)

Se milito aŭ malpaco inter kelkaj de la kunĵurintoj okazos, aŭ se parto el la interbatalantoj ne volas akcepti juĝeldiron aŭ pagi kompenso, la kunĵurantoj sin devigas protekti la alian parton.

Kio ĉi tie skribita kaj decidita estas, estas dekretita al komuna utilo kaj bono kaj devas, helpu nin Dio, daŭri eterne. Por tion fari oficiale konata, ĉi tiu letero laŭ postulo de la nomitaj kunĵurantoj estas verkita kaj estas per la sigeloj de la tri komunumoj kaj valoj akceptata kaj konfirmata. Tio okazis en la Jaro de la Sinjoro 1291 en la komenco de la monato Aŭgusto.

*** * * * *

La originalo estas en la latina, kaj troviĝas en la arkivo de Schwyz.

Lando de kunĵurantoj

Svislando estas internkontinenta montŝtato en centra Eŭropo. Ĝi situas en la norda mildzono kaj apartenas al la centeŭropa tempzono. Ĝia situo en la Mezalpoj ĝin igas la frontregiono de gravaj eŭropaj riveroj kaj grava trafiklando.

60% de la svisa teritorio apartenas al la Alpoj. 10%jn plenigas la Svisa Juro. 20% da alpareo situas en Svislando. Alpoj estas meze 1700 m altaj kun maksimumo 4634 m. La meza alteco de Juro estas 750 m, la maksimum-alteco estas 1718 m.


Pro ĝia situo Svislando havas parton en ĉiuj kvar klimat-regionoj eŭropaj, krom tio la forta altecdivideco kreas multe da regionaj kaj lokaj klimatoj kaj tial jam la natursciencisto A. von Haller povis diri: "Helvecio prezentas preskaŭ ĉiun vegetaĵregionon de Laplando al Hispanujo."

Svislando devenis de aroj de eŭropaj popoloj en la protekto de Alpoj al nacio kaj ŝtato. Post la morto de reĝo Rudolf I la valoj Uri, Schwyz kaj la nidvaldaj komunumoj aranĝis en 1291 eternan pakton por protekti siajn malnovajn rajtojn kontraŭ la aŭtoritato de Habsburg.

La libera ŝtatligo aliancigis en 1353 kelkajn urbojn al la kampuloj. Per militado kaj aĉetado ili gajnis subordajn teritoriojn.

La kunĵuranaro apartiĝis en 1513 de la (germana) Imperio kaj startis potencpolitikon. Ĝia malsukceso kaj la reformacio gvidis al la neŭtraleco.

La franca revolucio kreis unuecŝtaton, likvidis ĉiujn privilegiojn de aristokataro kaj nobelaro, donis kred- kaj presliberecon. Napoleon kreis ligoŝtaton kun 19 kantonoj. Deputaro transprenis la eksternpolitikon.



"Landesgemeine" - popolkunveno. Tiun praformon de la rekta demokratio konas kvin kantonoj ankoraŭ.



La federacia parlamento.

La falo de Napoleon alportis denove liberan ŝtatligon kun nun 22 kantonoj. La popolarajtoj estis kelkloke limigitaj denove. La neŭtraleco de la Konĵuranaro estis internacie agnoskita en 1815. Kun la konstitucio de 1848 la kunĵuranaro en sia nuntempa formo estis kreita.

En 1970 Svislando havis 6 270 000 loĝantojn. Kun la meza popoldenseco de 154 loĝantoj/km² Svislando estas dense loĝata lando. 65% de la loĝantoj parolas germane, 18% france, 12% itale, 1% retoromane kaj 4% estas aliparolaj.

Svislando estas ŝtato de komunumoj kaj kantonoj: ili havas aŭtonomion grandskalan. La 3959 svisaj komunumoj estas malgrandaj respublikoj en la periferio de sia aŭtonomio. La politika komunumo estras sian propran teritorion kaj sian loĝantaron, elektas siajn politikajn instancojn (ankaŭ la instruistoj estas elektendaj!) Ĝi donas la ŝtatanecon, kontraŭ tio ĝi estas suborda alla kantona konstitucio. La kampoj de ĝiaj taskoj iras delernejoj kaj naĝejoj trans la akvo- kaj energiprovizo ĝis vojkonstruado, policaj kaj militaj taskoj.

Ĝis 1782 estis la Kunjuranaro ŝtatligo, en kiu la individuaj lokoj fiksis la politikon. Napoleon starigis en 1803 apud la malnovaj 13 6 novajn kantonojn, al kiuj post lia falo 3 pluaj venis. En 1978 estis de la malnova kantono Bern desplitita Jurasio, tiel ke nun Svislando nombras 23 kantonojn, el kiuj 3 estas dividitaj en duonkantonojn. La duonkantonoj elektas nur unu senatkonsilanton, sed havas alia ĉiujn rajtojn de kantono. La svisa ligoŝtato havas 26 suverenajn individuŝtatojn. La Konfederacio gardas la internan kaj eksteran sekurecon, estas kompetenta pri dogano, eksternpolitiko, poŝto, mono kaj armeo. Ĝi garantias la kantonkonstituciojn.

La kantonoj havas la devon de reciproka helpo kaj paco. Konfederacio kaj kantonoj estas demokratiaj respublikoj. Eksterpolitike Svislando baziĝas sur la principo de neŭtraleco.

Svislando konas kelkajn rektodemokratajn aranĝojn, kiuj permesas al la civitano larĝajn eblecojn por aktiva partopreno en la politika vivo. La elektrajto, la voĉdonrajto, la petic- kaj referendumrajto estas gravaj elementoj de la svisa politika sistemo. Por la svisa demokratio speciale gravaj estas la referendum- kaj la iniciativrajto. 50 000 voĉdonrajtaj aŭ 8 kantonaj povas peti la popolvoĉdonon pri konfederacileĝoj. Konstituci-ŝanĝoj devas en ĉiu kazo, por ekvalidi, esti aprobitaj de popolo kaj kantonoj. La plej vasta rajto de la svisa civitano estas la iniciativrajto: 100 000 voĉdonrajtitaj povas peti konstituciŝanĝon. La decido estas en ĉiu kazo ĉe popolo kaj kantonoj. La leĝdon-aŭtoritato estas la Konfederacia Kunveno: En la Nacia Konsilantaro reprezentas 200 deputitaj la popolon. En la Nobelarkonsilantaro ĉiu kantono havas 2 konsilantojn. La Konfederacia Kunveno estas milicia parlamento: La deputitoj oficas apud sia profesio.

La reĝaŭtoritato estas la Konfederacia Konsilantaro, kolektivo de 7 ministroj. La Konfederacia Prezidanto estas elektita por 1 jaro. Ĉiuj svisoj estas defenddejav de la 20-a ĝis la 50-a vivjaro. La 20-jara sviso trapasas la rekrutlernejon de 17 semajnoj. Poste li estas ĉiujn 2½ jarojn por 2 ĝis 3 semajnoj armeservanta. Kiel nura soldato en la mondo la sviso prenas sian personan ekipaĵon, la fusilon kaj la municion hejmen.

Protektitaj plantoj:



Borstiger Schildfarn Türkenbund Wilde Tulpe Sibirische Schwertlilie Sumpfgladiole Gelber Alpenmohn Fluhroschen Spinnenorchis Helmorchis Grenobler Nelke Weiße Seerosen Alpen-Akelei Stengelloser Enzian Hoher Rittersporn

La svisa poŝto eldonas okaze de la kongreso specialan poŝtmarkon kun surskribo:




"64-a Universala Kongreso de Esperanto, Luzern 1979"

La marko estas aĉetebla sur unuataĝkoverto, en kvarbloko aŭ unuope.

Mendu ĉe: S.E.L. Svislando, N.R. Erik Otte, Mätteliweg 5, CH-8134 Adliswil.

Bonvolu pagi samtempe al lia poŝtĉek-konto 60-506 10, poŝtĉekoficejo Luzern (sFr 0.70/marko) aŭ aldonu al la mendo internaciajn respondkuponojn (1 IRK/marko).

la bildkartsvislando: Lucerno



Tegmentitaj lignopontoj el la mezepoko ankoraŭ servas por la piedirantoj.

En la 19a jarcento viroj kiel Rousseau, Byron, Shelley alportis la turismon al Svislando. Sed plej granda reklamo por la lando estis la teatraĵo "Wilhelm Tell" de Friedrich Schiller.

Aristokratoj, artistoj kaj ordinaraj turistoj venis kaj venas por vidi la praŭrbon, la lagon kaj la montojn, la lignajn Kapell- kaj Spreuer-pontojn kun iliaj fantaziplenaj pentraĵoj, kaj neforgesindas la belegaj barokpreĝejoj. Neniu turisto volas preterlasi la Leonmonumenton. Ĝi rememorigas la batalon de la Svisa Gvardio ĉe la Tuilleries dum la franca revolucio. Tute proksime situas la glacieja ĝardeno. Neĉi proksime de la urbocentro situas ĉarma vilao, en kiu loĝis Richard Wagner dum ses jaroj.

Al luzernvizitantoj apartenas ankaŭ vaporŝipovojaĝo, kiel ankaŭ ekskurso al la monto Rigi per la eŭrop-unua dentferovo de 1871, aŭ al la monto Pilatus per la plej kruta dentferovo en la mondo kun kruteco de 48%! En la en 1959 malfermita Trafikmuzeo vi povas vidi ĉion, de portilo al satelito. Ĝi estas la plejvizitata muzeo en Svislando.

Ebriiĝanta esenco de Svislando en unu rigardo: En la antaŭo lamezepoka urbo, malnovaj urbomuroj kaj tegmenthavaj lignopontoj trans la rivero Reuss. Sur la blua akvo la neĝblankaj cignoj. En la malantaŭo la majesta almtontaro. Tio estas Luzern.

Luzern altiras ĉiujare 2 mi-ojn da vizitantoj. Oni diras pri ĝiaj loĝantoj, ke ili estas plivivoĝojaj ol aliaj germanvisoj. "Plimulte mallaboremuloj, kaj sindonaj al vino", tiel skribis franca diplomato al sia reĝo, Ludvig XIV. Sed lucernanoj povas esti tre energiaj kiam temas pri konservo de tradicioj. En la pasinta jaro Luzern povis festi sian 800-jaran naskiĝtagon.

En la 8.a jarcento estiĝis monaĥejo sur la nordokcidenta lagobordo kaj ek de 840 la regiono estis konata kiel Luzern. Kiel centro por fiŝkaptado kaj religio nombris la komunumo en la 12.a jarcento sufiĉe da loĝantoj por ekhavi propran pastron. La permeso estis subskribita je la 18a de aprilo 1178 kaj tiu dato validas kiel naskiĝtago de la urbo.

Novan prosperon alportis en la 13a jarcento la Gotthardvojo, kaj pli poste la industriirevolucio. Sed la urbestroj rigardis nefideme al la malpuraj fabrikoj kaj fulgintaj fumtubo. Kion ili da industrio permesis, oni kaŝis malantaŭ montetoj. La urbo profitis sian malprogresemon.

En la nomo de la Sinjoro, Amen. Estas inda laboro kaj servas al komuna utilo la ligojn tiel krei kaj fortigi, kiel postulas tion la trankvilo kaj paco. Estu tial klara al ĉies kono:

Konfronte al la malbona tempo la viroj el la valoj de Uri, la komunumoj de la valoj de Schwyz kaj la komunumoj de la malaltaj valoj de Unterwalden en bona fido promesis por si mem kaj sian posedaĵon pli bone protekti kaj sekuigi: reciproke helpi unu la alian per helpo, konsiloj kaj bonvoloj, per vivo kaj havaĵoj, tiel en kiel ekster la valoj, per ĉiu forto kaj potenco, kontraŭ ĉiu aŭ ĉiuj, kiu ilin aŭ unelili perfortas, minacas aŭ intencas malbonon al ilia vivo aŭ havaĵo. Kaj tion promesis tiuj ĉi komunumoj, en ĉiu kazo rapidi al la helpo de la aliaj, tuj kiam tio necesas, eĉ je propra kosto, se tio estas bezonata por kontraŭstari atakojn aŭ por venĝi jam faritan maljuston. Je tio ili komune ĵuris, sen iu hezito tiun promeson plenumi, kaj tiel ili renovigis la malnovajn ĵure konfirmitan staton den kunĵuraneco. Tamen tiel ke ĉiu laŭ la rango de sia nomo kondutas, obeas kaj servas sian sinjoron, kiel tio endas.

Krome ni en komuna konsilo unuanime kaj unuvoĉe promesis, decidis kaj dekretis, ke ni en la supre nomitaj valoj neniu juĝanton prenos aŭ agnoskos, kiu sian oficon kontraŭ iu ajn prezo aŭ pago ricevis, aŭ kiu ne estas nia kunlandano kaj kuncivitano.


Se tamen malpaco inter la kunĵuranoj ekestos, la plej saĝaj el la kunĵurintoj alretros, por interpacigi tiel, kiel tio al ili juste ŝajnas. Kiu tiun juĝon malestimas, kontraŭ tiu la aliaj kunĵurintoj ekstaru.

Super ĉio estas inter ili decidata: Kiu iun alian intence kaj sen ties ŝuldo mortigos kaj kaptigos, perdu sian vivon, li havu okazon sian senkulpon pruvi. Se li forfuĝas, li ne rajtas reveni. Kiu tian malbonfaranton gardas kaj protektas, estu ekzilata el la valoj, ĝis li de la kunĵurintoj estos revokata.

Se iu tage aŭ dum nokta silento malbonintence metas fajron al la domo de kunĵurinto, tiu neniam poste estu akceptata kuncivitano. Kaj kiu tian misfaranton helpas kaj protektas en la valoj, devas kompensi la perdojn de la difektito.

Krome se unu el la kunĵurintoj perdigas aŭ difektas la havaĵojn de alia, oni konfisku la posedaĵojn de la ŝuldhava, se li havas tian en la valoj, por ke la perdinto rehavu siajn havaĵojn.

Krome neniu rajtas alpróprigi al si ies garantiaĵon, tiu tiukaze oficiale estu lia ŝuldata. Eĉ tiam tio ne povas okazi sen permeso de juĝanto. Plue ĉiu devas obei al la juĝanto, kaj, se necese, mem nomi la juĝanton de la valo, sub kies juĝo li staras. Se iu kontraŭstaras juĝon kaj per tio kreas malutilon al kunĵuranto, ĉiu el la ligoj havas la devon devigi la necedemulon al kompenso.



Sciigoj

Brita evento:

Sabate la 23-a de junio estos Gasto-tago de Fryland Wood Skolta Tendejo apud Croydon. Miloj da skoltoj vizitos ĝin, kaj oni invitis SEL por starigi informbudon!

Alia brita:

Warwickshire Skolta Internacia Tendaro aranĝigos jam la 21an fojon. Kiu volas viziti ĝin, povas sin anonci ĉe Barrie Clark, A.C.C. 23 Wordsworth Road, Coventry CV2 5HT.

Kaj Hispanujo:

Skoltoj el Madrido partoprenis en Merseyside Internacia tendaro en julio 1978 kaj mirigis la publikon per siaj aktivecoj. La skoltado nun estas oficiale permesata en Hispanujo, pro kio ni tre ĝojas.

Polujo

ankaŭ havas sian skoltadon kaj la apuda bildo venis al ni el tiu lando. Sub la foto estas la emblemo por skoltoj kaj skoltinoj. Tiu "skolta kruco" estas projektita de pastoro Lutostawski en la jaro 1912.

En Nederlando

okazos la 35-a Internacia Junulara Kongreso ek de la 20a ĝis la 27a de julio en Austerlitz apud la urbo Zeist. Oni kreos interesan programon kun i.a. ekskurso al interesaj historiaj kaj vidindaj lokoj. Kotizo por parteprenado de 185 ĝis 270 guldenoj depende de aĝo kaj dato de aliĝo. Adreso de la kongreso:

35-a IJK 1979, Postbus 4083 - 9071 EB Groningen, Nederlando.

El Nov-Zelando

ni ricevis du petojn pri korespondo:

Peter Hendriks, Moorehouse St, Ross, Westland, Nov-Zelando kaj

Paul Sutherland, 9 Atlanta Grove, Kowhai Park, Brook-

lyn, Wellington 2, Nov-Zelando.

*
Peter havas 15 jarojn kaj estas "sola skolto" (t.e. ne apartenas al trupo ĉar li loĝas fore.) Li estas komencanto pri Esperanto.

Paul estas juna skoltestro kaj rovero, kaj serĉas leteramikon en ne angla parolanta lando. Li estas komencanto pri Esperanto.

*
Ni ne povas tro forte substreki la valoron de tiu leteramikeco, ĉar per ĝi la valoro de la Internacia Lingvo vere montriĝas.

Muzika Kulturo

petas, ke ni informu pri ties laboro por eldono de muzikaĵoj-disko, kasedo k.t.p. Oni deziras kunlaboron de ĉiuj esperantistoj, kiuj kutimas kanti, ludi muzikilojn, traduki kanzonojn, aŭ simple aŭskulti.



Wesół i śmiały, dzielny, choć mały
oto jest chłopak zuch.
Szczudła, luk czy lanka, latawiec, skakanka,
w zabawach sam za dwóch!

Do ne temas nur pri "konsumantoj" sed pri aktiva kunlaboro. Skribu al Muzika kulturo ĉe Centro di Documentazione Esperantista, Via dei Sabelli 54, I 00185 Roma, Italujo.

El Italujo ni ankaŭ ricevis jenon: "Oni ne trovas liberajn plaĝojn? Ĉu la malmultaj liberaj etendaĵoj estas plenokupitaj de banuloj? La junaj skoltoj de la patrolo "Leif Erikson" havis ideon por restadi dum tuta semajno ĉe la roka marbordo de Trieste: Malnovaj aertuboj, duonrebonigataj tabuloj eltrovataj en la ĉirkaŭaĵo....kaj jen flosanta kampadejo. Ĝi eĉ permesis ŝpiradon por la distanco de 8 km laŭlonge la marbordo. Originala solvo ne malpermesata de iu ajn aŭtoritato. Vidu la bildojn sur la malantaŭa paĝo de nia LSM.

En Svislando okazos venontsomere ne nur la Universala Kongreso de UEA la 28an de julio ĝis 4a de aŭgusto, sed ankaŭ la 13a konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Lokarno de la 19a ĝis la 28a de julio. La 4an ĝis la 11a de aŭgusto la Kristana Esperantista Ligo Internacia kongresos en Bieneberg. Por la skolta movado ambaŭ devus havi intereson kaj eventuale doni profiton.



LETERO EL LA SUDO

Poŝtejen iras mi en la vespero, kaj jen, en mia taggazeto el fremda lando estas nun letero - kaj ĝi komencas per la jena peto:

"Mi emas lerni iom pri la mondo, kaj tial petas vin pri korespondo."

Ekstere estas vintro nun, glacia; en la letero el la lando suda jen kuŝas ĉarma bild' fotografia de junulino bela, duonnuda:

"Jen mi sur nia bana strando, ĉar varma estas mia lando."

Mi iras hejmen al la forno varma, rigardas el fenestro al pejzaĝo de montaro - ĝi estas blanka, blua, bela, ĉarma eĉ dum ĉi tiu parto de la jaro:

"Nun skribu vi, ĉu prave famo diras: en via land' glacio-ursoj ĉie iras."

("glacio-urso" = blanka urso)

H.A.R.

SURPRIZO

Angilon portis cikoni' sed perdis ĝin pro forta kri' de Jens kaj Petro. Al patrin' la knaboj tuj transdonis ĝin, sed ambaŭ pensis: "Bona Di", ĉu tia iam estis mi?"

Ĉe la avino: "Diru vi jen kion donis cikoni' al ni hieraŭ?" "Donis? Ne!" "Frateton". "Ĉu fra-" "Jes, kaj se vi kredi volas: La patrin' al la tagmanĝ' kuiris lin!"

("Raduko de poemo de la dana pastro kaj verkisto kaj Munk. El lia poemaro "Knaldperler" "Petardoj".)

Ambaŭ poemoj el la kajero "El propra kaj fremda" de Hans Amund Rosbach.

raporto de nia ligo

En ĉi tiu jaro ni nek spertis gravajn problemojn nek havis kaŭzon por granda ĝojo. Unuflanke kelkaj malfacilaĵoj ĝenis nin, aliflanke ni sukcesis venki kelkajn problemojn.

La serio de informigaj libretoj "Vastaj Horizontoj" kompletiĝis per la kataluna eldono, kaj nun konsistas el 8 libretoj. Pri la araba eldono ni provizore devis rezigni. En Svedujo kaj Italujo oni preparas naciajn eldonojn.

Malĝoĝige estis la fakto, ke niakunveno en Varna dum la U.K. ne povis okazi.

Tre ĝena estis la plua malplivaloriĝo de la brita mono. Tio devigis nin presigi nian gazeton "La Skolta Mondo" en Britujo. Tio, kune kun la tempomanko de nia redaktoro, estis la kaŭzo ke nur tri numeroj aperis en la jaro 1978 mem. Kun danko ni konstatis la helpemon de Brita Esperanto Asocio pri ĉi tio.

Regula aldono al niaj korespondaĵoj estis folio kun propono pri kunlaboro. Pro ĝi ni povis noti kelkajn novajn helpantojn. La Itala sekcio komencis la eldonon de propra bulteno.

La reto de Naciaj Reprezentantoj kompletiĝis per novaj funkciuloj en Madagaskaro, Portugalujo, Svislando kaj Usono, dum por Germanujo ni trovis provizoran helpanton. Eb la Centra Komitato Paul Ronald transprenis la taskon de Alan Fineberg, kiu dum kelkaj jaroj servis nian Ligon tre bone.

Dum la lasta parto de la jaro relative multaj petoj pri informoj atingis la sekretario, ĉu pro niaj libretoj, ĉu pro artikoloj en naciaj skoltgazetoj.

Dum la lastaj monatoj la prezidanto faris planon por iom ŝanĝi kaj por plifortigi la organizaĵon de Nia Ligo kun la celo, ke ni pli efike povu penetri en la Skoltan Movadon.

Ni ankaŭ donis specialan atenton al niaj rilatoj kun landoj kie ekzistas skolta aŭ simila organizaĵo, kiuj ne aliĝis al la internaciaj movadoj en Genevo kaj Londono.

Por la Centra Komitato de SEL

John Berggreen
prez.

J. K. Hammer
ĝen.sekr.

Ni ricevis.

El Hungarujo ni ricevis belan kajeron kun "bildrakonto", t. e. romano, en kiula ĉefenhavo estas redonata per desegnitaj bildoj, kaj la teksto nur estas la redonitaj replikoj de la personoj.


Temas pri tri filoj de grand-sinjoro ĵus mortinta. Dum la mort-momento li klarigas al la edzino sian lastan volon, sed ŝi - nomante lin ŝtonkora homo - ne volas sekvi ĝin. Kaj la rakonto do montras tion, kio poste okazas.

Hungara Esperanto-Asocio eldonis la libron. La bazan rakonton verkis la hungara aŭtoro Mór Jókai (1825-1904) en la jaro 1869 kiel pli ol 500-paĝa romano kun la samatitolo "La filoj de l'ŝtonkora homo". La bildrakonto redonas tiun ĉi romanon per 64 paĝoj, kiujn desegnis Pál Korcsmáros kaj verkis Tibor Cs Horváth. La esperantlingvan tekston ni dankas al Vilmos Benczik. Kaj la celo de la eldono kompreneble estas la duobla: Doni al novuloj kaj aliaj facilan legaĵon, kaj konatigi ilin kun la hungara literaturo en plaĉa maniero.

La kajeron vi povas mendi:
ISBN 963 571 038 0.



El itala somero.
Vidu informon en
la numero pri la
aktiveco de la
italaj skoltoj.



REDAKCIO **BAMBLEV. 2** 37 00 SKIEN

NE ISSN 0037-6558